


45
RADIO-DRAMO

EN LA NEBULO



Japanana Esperanto-Instituto

RADIO-DRAMO
EN LA NEBULO

de

JUZO JAMAMOTO

*kun la permeso de l' aŭtoro
el Japana lingvo tradukis*

KIJOHIKO CUJUKI



1931

TOKIO

JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Ŝin-Ogaŭamaĉi III-15, Uŝigomeku

Unua mil eldono 1931

EN LA NEBULO

— PERSONOJ —

Ŝipestro

Direktl'isto

Ĉef-maato

Ĉef-maristo

Multaj ŝipanoj

Motomura

Voĉo

Tria maato

Voĉo de ŝipanoj


Dua maato

Ĉef hejtisto

Furujama

Voĉo (Curuoka)

EN LA NEBULO



Sur la ŝargŝipo en veturado. Unue sur la komandantponto. Oni aŭdas intertempan sirenon senĉese. De malsupre, el la maŝin-ĉambro venas iom malforta bruo de la maŝino.

Tria maato:—Kiam do ĝi fine foriros? Efektive tre densa nebulo, ĉu ne?

Ŝipestro:—Tre dense, precipe hodiaŭ vespere.

Tria maato:—Jes, por la unua fojo mi spertas la Kamĉatkan linion, sed malpli bone, ol mi aŭdis. Neniun tagon sen la nebulo ni havas depost la ekforiro!

Ŝipestro:—Jes, en la somero estas ĉiam tiel malbone.

Tria maato:—Sub tia kondiĉo oni tre malfruos atingi al „Petropaŭlovsk“.

Ŝipestro:—Devas esti tiel, ni ne povas rapidi en tiu ĉi stato.

Tra la ventolilo oni iom aŭdas bruon de ŝovelado de karboj en la kaldrona ĉambro kaj kanton de hejtistoj, kiuj kantas ŝovelante karbojn. Sed oni nur aŭdas ilin parte, malhelpate de l' bruo de la maŝino kaj alarma sireno.

Ĉu ne salutis vin, ho hej,

.... marvastej'

.... —mastul'

.... —*maru*, la karul' ?

En la mllum' per parpebrum'

Briletas vojirada lum'

Ĉu estas, ne ?

.... —*maru*, hola he !

Tria maato:—Ŝipestro, ĉu vi ne volus iom ripozi ?

Ŝipestro:—Ne, mi ja ne devas forlasi la komandant-ponton en tia nebulo !

Tria maato:—Sed estro, vi certe tre laciĝas, ĉar preskaŭ ĉiutage vi ne ripozas.

Ŝipestro:—Jes, mi certe laciĝas. En mia kapo estas malklare, kiel en tiu ĉi nebulo.

Tria maato:—Vi tiel vin sentas, ŝipestro ? Al mi

ankaŭ la kapo ne tre bone funkcias, ĉar mi ne ĝuis la lumon de la suno en la lastaj tagoj.

Ŝipestro:—Vi ne devas lasi vin venkita de la nebulo. En tia veturado vi devas persiste rigardegi la nebulon rekte en ĝian vizaĝon.

Tria maato:—La nebulon en la vizaĝon?

Ŝipestro:—Jes, rigardu la margason kun la tuta energio streĉita, kaj tiam la nebulo mem baldaŭ forkuros....

Tria maato:—Momenton, estro! (Subite fajfas)

Ŝipestro:—Kio?

Tria maato:—Jen, ĉe la posta parto....

Ŝipestro:—Ĉe la posta parto?

Dume ekhaltas sono de la paŝoj, kiuj aŭdiĝis sur la ŝtuparo.

Voĉo:—Jen mi estas.

Tria maato:—Ho, direktilisto, rapidu al la posta parto, ĉar mi vidis ion strangan.

Direktilisto:—Jes, laŭ via ordono.

Rapide foriras la paŝoj de la komandantponto.

Ŝipestro:—Kion vi vidis?

Tria maato:—Nu, mi ne vidis klare, sed, ŝajnas al mi, io nigra forruliĝis sur la ferdeko.

Ŝipestro:—Io nigra?

Tria maato:—Jes, io nigra.

Ŝipestro:—Ĉu vi vidis per teleskopo?

Tria maato:—Ne, sed, mi ekvidis ĝin, kiam mi okaze min turnis.

Ŝipestro:—En tiu ĉi nebulo?

Tria maato:—Jes, estro.

Ŝipestro:—Ĉu vi ne erare al vi tiel imagis?

Tria maato:—Ne, mi ne kredas, ke mi faris eraron.

Ŝipestro:—Ĉu vere? Ni ne devas preterlasi ion sen atento en tia tempo.

Tria maato:—Ankaŭ mi tiel opinias.

Suprenirantaj paŝoj de direktilisto sur la ŝtuparo.

Direktilisto:—Tria Oficisto, kvankam mi iris tien, nenion mi tamen vidis.

Tria maato:—Ĉu vi plene esploris ĉe la posta parto?

Direktilisto:—Jes, sed ŝajnas al mi, ke nenio okazis.

Tria maato:—Ĉu efektive? Do, eble estus mia erara imago! Dankon al vi!

Direktilisto:—Jes.

Malsuprenirantaj paŝoj de la direktilisto sur la ŝtuparo.

Baldaŭ oni aŭdas unu-baton de sonorilo de la antaŭparto kaj aŭdiĝas voĉoj de la observisto ĉe la antaŭmasta topo, dise forblovataj de vento.

Observisto:—Ĉe la verda antaŭ-parto lanternon vidas.

Ŝipestro:—Bone. (Respondas per longe trenata voĉo)

Tria maato:—Mi vidu per teleskopo.

Ŝipestro:—Ĉu vi ion vidas?

Tria maato:—Jes mi vidas, kvankam malklare, verdan lanternon ĉe unu grado de triborda antaŭparto.

Malproksime intertempe, oni aŭdas alarman sirenon.

Ŝipestro:—Ho, aŭdiĝas fajfado, ĉu ni iom respondu?

Tria maato:—Jes, certe.

Ŝipestro:—(Ordontone, sed malrapide) Verden!

Direkttilisto, kiu direktas la ilon ĉe la komandant-ponto:—(Ripetas) Verden, estro.

Alarmaj sirenoj de ambaŭ ŝipoj eksonas alterne. La fajfado de la alia ŝipo pli kaj pli proksimiĝas.

Ŝipestro:—(Per trenata voĉo) pluen!

Direkttilisto:—(Ripetas) pluen, estro.

Bruas direktiltrado, kiun oni turnas.

Tria mato:—La ŝipo estas revenanta de „Kamĉatka“?

Ŝipestro:—Kredeble jes.

Tria maato:—Tiu ankaŭ estas multe ĉagrenita de la nebulo, ĉu ne?

Ŝipestro:—Jes, verŝajne.

Dume tiel sonadis ambaŭ sirenoj kaj baldaŭ la sonado de la alia ŝipo iom post iom malproksimiĝas.

Ŝipestro:—(Ordontone) Rektigu!

Direkttilisto:—Rektigu, estro.

Li ripetas kaj sonorigas signalilon. Ankaŭ el malsupre la sonorado iom malforte aŭ liĝas.

Dum momentoj, oni aŭdas nur intertempan sonon de sireno kaj malgrandan brueton de la truniĝanta maŝino.

Subite oni aŭdas etan plaŭdon ĉe la antaŭparto.
Kaj de la ferdeko :—

Voĉo :—Ha ! iu falis.

Tria maato :—Kio ?

Voĉo :—Iu falis de la ruĝa flanko.

Ŝipestro :—Rapidu enĵeti savbuon !

Apenaŭ la vortoj finas, jam la savbuo estas enĵetita sur la maron kun plaŭdo.

Voĉo :—Jen, oni enĵetis ĝin.

Ŝipestro :—... (ordonas kun trankvileco) Ruĝen tute.

Direkttilisto :—(iom rapideme ripetas) Ruĝen tute, estro !

Ŝipestro :—Haltigu maŝinon !

Tria maato :—Haltigu maŝinon, estro !

Oni sonorigas la signalilon. Tuj kiam oni respondas ankaŭ de malsupre, subite oni haltigis la vapormaŝinon. Pro tio, terure bruas la vapore, kiu eliĝas de la averta klapo.

Ŝipestro :—Nulo !

Direkttilisto :—Nulo, estro.

Ŝipestro :—Malen !

Tria maato :—Malen, estro.

Ŝipestro :—Haltigu maŝinon !

Tria maato :—Haltigu maŝinon, estro !

Oni sonorigas la signalilon. Ankaŭ malsupre ĝi eksonas.

Ŝipestro :—Lanĉu la duan boaton babordan ! Tria maato, vi estu boato-mastro.

Tria maato:—Jes. (Paŝoj rapide malsuprenirantaj la ŝtuparon)

Baldaŭ oni aŭdas brueton de la malhisado, tuj kiam la boato plaŭde atingas la akvon, jam oni aŭdas knaron de remiloj kaj voĉojn de homoj, kiuj remas. Kaj tio malproksimiĝas pli kaj pli.

Ŝipestro:—He, eklumigu ŝarglampon ĉe la ruĝa flanko!

De malsupra ferdeko, oni aŭdas voĉon de ŝipano, kiu kuretante respondas „Jes, jes, estro.“

Sinsekve sur la ferdeko:—

Voĉo:—Kio, kio estas?!

Voĉo:—Kial la ŝipo ekhaltis?

Voĉo:—He, kio okazis, kio okazis?

Kune kun tiaj voĉoj, oni aŭdas paŝojn bruege suprenirantajn sur la ferdekon.

Ŝipestro:—(per megafono) He, ĉu vi trovis?

Tria maato:—(ankaŭ per megafono, sed nur tre mallaŭte oni aŭdas la voĉon) Ankoraŭ nenion ni trovas.

Ŝipestro:—Ĉu vi rekonis la lokon de la savbuo?

Tria maato:—Jes, la savbuon ni vidas ĉi tie, sed neniu troviĝas apude.

Ŝipestro:—Traserĉu bone la ĉirkaŭon!

Tria maato:—Jes, laŭ via ordono.

Voĉo sur la ferdeko:—He, kio okazis?

Voĉo:—Oni diras, ke iu ensaltis en la akvon.

Voĉo:—Kio, ĉu iu ensaltis en la akvon?

Tria maato:—(per mallaŭta voĉo, kvankam per megafono)
Ŝipestro, neniel ni povas trovi!

Ŝipestro:—Ĉu oni ne povas trovi? (per megafono) Sed,
ankoraŭfoje bone serĉu!

Voĉo sur la ferdeko:—He, oni diras, ke oni nenion
povas trovi!

Voĉo:—Kiu estas, do, kiu sin ĵetis?

Voĉo:—Mi ne scias.

Voĉo:—Diablo! Oni kaŭzas tian ĝenon en tiu ĉi tempo
de la nokto!

Tria maato:—(per megafono) Ŝipestro, nenion ni povas
trovi, kiel ajn zorgeme ni traserĉis!

Ŝipestro:—Do, (per megafono) revenu!

Paŝoj suprenirantaj sur la ŝtuparo.

Voĉo:—Ŝipestro!

Ŝipestro:—Ho, ĉef-maato, vi alvenis en la ĝusta
momento. Oni ne scias, kiu ensaltis en la akvon. Pli
bone ni faru inspekton malgraŭ nokto. Kolektu la
ŝipanaron sur la ferdekon, mi petas. Mi ankaŭ iros tien.

Ĉef-maato:—Laŭ via ordono.

Iliaj paŝoj malsuprenirantaj sur la ŝtuparo.

Ĉef-maato:—(ordone) Tuta ŝipanaro sur la ferdekon!

Ĉef-maristo :—Ĉiuj jam estas sur la ferdeko pro la okazo.

Ĉef-maato :—Ĉu jes? Do, ni komencu inspekton, respondu, mi petas. Ĉef-inĝeniero Dua maato dua maato jen estas. Tria maato estas boat-mastro, do, nenio estas ĉe la oficistoj. Nu, nun, ĉef-maristo!

Ĉef-maristo :—Jes.

Ĉef-maato :—Ĉef-hejtisto!

Ĉef-hejtisto :—Jes.

Ĉef-maato .—Kaj krom la personoj, kiuj iris en la boato . . . Joŝikaŭa!

Joŝikaŭa :—Jes.

Ĉef-maato :—Motomura!

Motomura :—Jes.

Ĉef-maato :—Arita!

Arita :—Jes.

Ĉef-maato :—Tacuo!

Tacuo :—Jes.

Ĉef-maato :—Furujama!

Furujama :—J . . e . . s.

Ĉef-maato :—Koiso!

Koiso :—Jes.

Ĉef-maato :—Curuoka! — Curuoka! Ĉu Curuoka ne prezentigas?

Furujama :—Ho! Curuoka ne troviĝas?

Ĉef-maato :—Eble li estus dormanta en la kajuto. Iru serĉi !

Furuĵama :—Jes. (forkuranta paŝo)

Ĉef-maato :—Kaj sekvanta Urakami !

Urakami :—Jes.

Ĉef-maato :—Itano !

Itano :—Jes.

Ĉef-maato :—Tosaki !

Tosaki :—Jes.

Ĉef-maato :—Estro, nur Curuoka ne prezentigas.

Ŝipestro :—Do eble povus esti Curuoka ! Sed organizu serĉ-bandojn por certigi, mi petas, kaj serĉu en la tuta ŝipo !

Ŝipano :—Jes.

Ŝipanoj rapideme ekkuras, kaj jen de la ŝipoflanko, jen de mal-supre oni aŭdas voĉojn de ŝipanoj, kiuj vokas „Curuoka“.

Sono de la boato proksimiĝanta.

Ŝipestro :—Jen la boato revenis. Hisu ĝin !

Ŝipano :—Jes.

Oni malhisas ŝnuron, kaj baldaŭ oni aŭdas brueton de la hisigita boato.

Kaj sekvas desaltantaj paŝoj el la boato.

Tria maato :—Ŝipestro, tre domaĝe ! neniel ni povis lin trovi.

Ŝipestro :—Ĉu vere ? Kion do ni faru ? . . . Dankon por vi !

Paŝoj de Furuĵama, kiu revenis.

Furuĵama :—Ĉef-maato, Curuoka ne troviĝas en sia kajuto.

Ĉef-maato :—Ĉu li ne troviĝas? Ĉu vi serĉis lin aliloke?

Furuĵama :—Jes, mi serĉis lin, kiom mi povis, sed neniel mi povis lin trovi.

Ŝipano alkuras per rapida paŝo.

Motomura :—Ĉi tio estis demetita ĉe la paveza ferdeko.

Ĉef-maato :—Kio estas? Ho, laborvesto! Ĉu ĝi apartenas al Curuoka?

Motomura :—Jes, alkudrigita estas lia nomo.

Ĉef-maato :—Serĉu poŝojn! Ĉu ne sin trovas ia skribaĵo?

Motomura :—(serĉfosas en la brusta poŝo) Nenion mi trovas.

Ĉef-maato :—Ĉu vere? Sed, jam nenia dubo pri tio, ke Curuoka ensaltis en la maron, ĉar restas ĉi tio.

Tria matto :—Ha, tiu bona kelnero? Kompaton al li!

Ŝipestro :—Jen, ĉiuj staru en vico ĉe la ruĝa flanko. Ni faru adiaŭan riverencon al la direkto, kien Curuoka ensaltis.

Iuj ripete vokas murmurete Budaan nomon: „Nam Amidabucu“.

Ŝipestro :—Nu jam estas malfrue en la nokto, nu, ĉiuj disiĝu! Deĵorantoj pretiĝu laŭ siaj postenoj.

Disirantaj paŝoj de personoj, kiuj babilas: „Pro kio li ensaltis en la maron!“ „Mi ankaŭ miras!“

Suprenirantaj paŝoj de Sipestro, Tria maato kaj Direktilisto sur la komandantponton.

Ŝipestro:—Maŝinon orde!

Direktilisto:—Maŝinon orde, estro.

Oni aŭdas la respondon de la signalilo.

Ŝipestro:—Antaŭen malrapide!

Direktilisto:—Antaŭen malrapide, estro.

Denove respondas la signalilo.

Ŝipestro:—Norden 55° oriente!

Direktilisto:—Norden 55° oriente, estro.

Bruo de la turniganta vapormaŝino. Plaŭdado de la antaŭ-enpuŝiganta ŝipo. La sireno tre ofte sonadas intertempe.

Ŝipestro:—Tria maato!

Tria maato:—Jes, estro.

Ŝipestro:—Ĉu Curuoka estis melankolia, lastatempe?

Tria maato:—Jes, sed ŝajnas al mi, ke li ne aspektis tiel

Ŝipestro:—La kelnero ne tre estis gajema, sed tamen li ne estis ankaŭ melankolia, ĉu ne?

Tria maato:—Jes.

Ŝipestro:—Diablo scias, kial li intencis sin mortigi! kaj krome, oni povas trovi almenaŭ ian skribajon, se li sinĵetus en la maron, mi pensas

Tria maato:—Jes certe.

Ŝipestro:—Kiam tagiĝos, ni esploru pli precize.

Tria maato:—

Ŝipestro:—La kelnero estis ja novulo ĉe ni, sed fidela kaj bona li estis. Mi tre lin domaĝas.

Intertempo.

Terura sono de la sireno.

Tria maato:—(pripenseme) Ŝipestro!

Ŝipestro:—Hm!

Tria maato:—Mi volas, ke mi restu silenta, sed neniel mi povas silenti, ĉar la konscienco riproĉas min

Ŝipestro:—Pro kio?

Tria maato:—Ŝipestro, por diri la veron, Curuoka estas mortigita de mi.

Ŝipestro:—Kion mi aŭdas?

Tria maato:—Kompreneble mi mem ne faris tion, sed same estas, kiel mi mem faris.

Ŝipestro:—Ĉu tion vi babilas sopra?

Tria maato:—Jes certe, estro! Mi tuton konfesas, ŝipestro, ĉar mi ja estas sopra. Mi batis lin hodiaŭ.

Ŝipestro:—Pro kio?

Tria maato:—Mi ordonis al li, ke li purigu miajn ŝuojn, sed li ne purigis ilin hieraŭ, nek hodiaŭ. Tio vundis al mi la senton tiel, ke mi donis al li fulman

survangan, kvankam poste mi sentis grandan bedaŭron pro li.

Ŝipestro:—Kaj tiam?

Tria maato:—Jen, la tuto....

Ŝipestro:—Do, tio estas la tuto, ĉu jes?

Tria maato:—Ne, estro, ne povas esti tiel.... mi.... mi....

Ŝipestro:—He, Sugino, vi estas tro nervema, vi ne bezonas tiel riproĉi vin men, ĉu ne? Jes, bati homon estas ne bone, sed nur pro tio, ke oni ricevis bateton survange, oni ne povas fariĝi tiel kuraĝigita sin ĵeti en la maron, mi pensas. Tiam do, devus troviĝi ia skribaĵo, kiu plendas kontraŭ vi, ĉu ne?

Tria maato:—Sed estro, nur kelkaj horoj pasis, post kiam mi batis lin.

Ŝipestro:—Mi opinias, ke li havus ian konflikthan aferon ĉe sia hejmo, kvankam mi ne povas diri pri tio kun certeco.

Tria maato:—Ĉu povas esti tiel? Sed estro, mi opinias....

Ŝipestro:—Vi ne ĝenu vin tiel....Ja, certe estas malbone, ke ni ekforveturis en la vendredo. Mi senzorge ekforveturis, ĉar mi rapidis al la celo. Certe estus pli bone en tia okazo, ke ni proktrastus. La nebulo ja sieĝis nin. Curuoka mortis. Mizero sur mizero!

Tria maato:—Mi petas pardonon, estro!

Ŝipestro:—Ne, kulpa ne estas vi.... Vi ne povas dormi en la nokto?

Tria maato:—.....

Ŝipestro:—Oni devas havi dormegon tiaokaze. Jam baldaŭ venos anstataŭiga horo, iru en la kajuton por diligente ronki. Estus pli domaĝe, se komencus nebulo eĉ en via kapo! Ha....ha....ha....

De malsupre eksonoras ok-sonoroj.

Kaj de la observisto ĉe la antaŭa parto:—

Observisto:—Lanternoj estas en ordo!

Jen tuj sekvas la raporto.

Ŝipestro:—Bone. (Respondas per longe trenata voĉo.)

Superenvenantaj paŝoj de Dua maato.

Dua maato:—Nu, oni sin anstataŭu! Vi laciĝas, ĉu ne? Pace ripozu!

Tria maato:—(senforte) Mi dankas.

Ŝipestro:—Tria maato! Se vi atingos la kajuton, vi tuj endormiĝu, trinkinte kelkajn glasojn da viskio.

Tria maato:—Jes, mi dankas, estro. Do, permesu min foriri!

Malsuprenvenantaj paŝoj de la Tria maato for de la komandant-ponto. Sinsekve li treniĝas sur alia ŝtuparo, malfermas pardon kaj eniras en sian kajuton.

Kaj kun bruo li ĵetiĝas sur la liton.

Tria maato:—Ha, mi estas laca!

Intertempo.

Sono de la sireno, bruo de la maŝino.

Tria maato:—Ĉu efektive nenio koncernas al mi, ke li mortis? ... Sed, mi miras, kial li ensaltis en la maron, hodiaŭ! Mi timas pro tio, ke mi donis al li la baton, nu ĉesu! En tia pensado oni mem tiras al si eĉ strangan humoron. Laŭ la disono de la ŝipestro, mi trinku almenaŭ viskion kaj diligente ronku hop!

Li leviĝas, kaj kraketaj sonoj de botelo kaj glaso, kiujn li metas sur la tablon.

Bruetado de botelo ĉe ektuŝo, kun glaso ktp.

Tria maato:—Ankoraŭ unu glason! Nu bone. Do, mi morte dormegos ĝis morgaŭ.

Aŭdiĝas susurado malvestiĝanta kaj kuŝiĝanta sur la lito.

Longa tempo.

Dume, sinsekvas sono de la alarma sireno kaj la bruo de la maŝino. De tempo al tempo, ĉe la intertempo de la sireno, oni aŭdas voĉojn vokantajn „maato, maato!“ aŭ „Tria maato!“

Tria maato:—Ha, malbenata fajfado! neniel mi povas endormiĝi ŝajnas, ĉiam ankoraŭ persiste la nebulo estas densa!

Jen, eksonoras dufoje la sonorilo.

Tria maato:—Ho, jam la dua! ... Diablo ĝin prenu—tiu ĉi sendormeco!

Voĉo:—Maato! maato!

Tria maato:—Kiu ĝi estas?

Voĉo:—Ĝi estas mi.

Tria maato:—Kial mi povus diveni, kiu estas tiu mi?
Ĉu vi ion havas por diri al mi?

Voĉo:—Jes, sinjoro.

Tria maato:—Do, eniru, mi petas.

Voĉo:—Jam mi ja estas en la kajuto.

Tria maato:—Jam eniris? Kie vi do estas?

Voĉo:—Ĉi tie mi estas.

Tria maato:—Kie? proksimiĝu ĉi tien!

Voĉo:—Jes, dankon, sinjoro.

Tria maato:—Kio okazis al vi, por viziti min en tia tempo de la nokto?

Voĉo:—Mi nur volas ion sciigi al vi, ĉar ŝajnas al mi, ke vi, maato, estas maltrankvila....

Tria maato:—Ĉu mi estas maltrankvila? Ki... kion tio signifas? Ha, vi do estas ...!

Kun mirego li malantaŭenŝovas sin kaj en tiu momento li puŝegas kontraŭ la muro. Kaj samtempe oni aŭdas bruon de io falanta, eble la pentraĵo, kiu estis pendanta sur la muro.

Voĉo:—Ne parolu per tia laŭta voĉo, mi petas, ĉar mi tuj estos rimarkita!

Tria maato:—Vi do estas....vi....

Voĉo:—Ne tiel timu. Ĉu vi pensas, ke mi estas fantomo? Neniel mi similas al ĝi. Curuoka estas mi.

Mi estas Curuoka en persono. Jen, la manoj estas moveblaj, kaj jen la piedoj ankaŭ estas ĉe mi, ĉu ne? Neniel mi estas estaĵo suspektinda.

Tria maato:—Do, vi ne

Curuoka:—Certe, mi ja ne mortis.

Tria maato:—Ĉu efektive?

Curuoka:—Jes certe, nu mi estas ĉi tie, antaŭ viaj okuloj. Ŝajne, vi nur imagas al vi, ke mi mortis, tamen vi eraras: mi ne mortis. Efektive vi iris serĉi min per la boato, sed oni ne povis trovi la kadavron? Estas ne miro, ke oni ne povis trovi ĝin, ĉar mi, kompreneble, neniam ensaltis en la maron.

Tria maato:—Ne ensaltis en la maron? Plaŭdon mi tamen aŭdis. Certe mi mem aŭdis plaŭdon, ke iu enfalis en la maron.

Curuoka:—Ne, vi trompiĝis. Mi ĵetis en la maron la sakon, kiun mi plenigis karbon.

Tria maato:—Do, kion signifas tiu via laborvesto, kiun vi lasis demetita sur la paveza ferdeko?

Curuoka:—Ĉu ĝi? Mi intence demetis ĝin tie, ĉar oni ne kredus, ke mi mortis, se ne estus forlasita almenaŭ la vesto. Kaj samtempe mi eĉ volis restigi ankaŭ skribajon, sed mi ĉesis tion, ĉar mi ekpensis, ke oni ne bezonas tiel fari.

Tria maato:—Do, vi efektive vivas?

Curuoka :—Kial la maato tiamaniere suspektas min? mia voĉo neniun trompas kiel vi aŭdas, ĉu ne? Mi ne povus helpi al tio, ke mi estu suspektata de vi, se mia voĉo estus tremanta, aŭ se mi sentus venĝemon kontraŭ vi. Do vi estu des pli trankvila, mi petas, ĉar neniom al mi tiel okazas.

Tria maato:—Ĉar tion mi aŭdas, nun ŝajnas al mi, ke vi efektive ne mortis.

Curuoka :—Terure obstina suspektemulo vi estas, maato!

Tria maato:—Do, mi nun vidas, ke vi vivas, sed tiam, pro kio vi ŝajnigis tian morton?

Curuoka :—Ĉar mi havis kaŭzojn pri tio.

Tria maato:—Kiajn kaŭzojn?

Curuoka :—Kiajn

Tria maato:—Eble pro tio, ke vi ĝuis bonan vangofrapon de mi, ĉu ne?

Curuoka :—Ne, ne povas esti tiel. Mi estis kulpa pri tio miaflanke. Ĉar mi neglektis vian volon, malgraŭ via ordono

Tria maato:—Sed ĉiuokaze estas nebone, ke oni batas alian. Pri tio certe mi estis malbona.

Curuoka :—Maato, maato, vi ne bezonas tiel zorgi pri mi, ĉu ne? Mi supozis, ke vi devus esti multe ĉagrenita, ĉar vi estas nerva, kaj mi vidas, ke tia vi estas. Mi venas ĉi tien por diri al vi, ke vi jam plu ne maltrank-

viligu vin pri tio.

Tria maato:—Do, ĉu vi neniom havas resenton de la afero kontraŭ mi?

Curuoka:—Neniom, certe.

Tria maato:—Ĉu efektive? Do, fine mia koro estas sensargita. Tamen, kial vi kaŭzis tian ludon? Ni faris por vi eĉ la lastan adiaŭon, ĉar ni kredis, ke vi efektive pereigis.

Curuoka:—Pardonon, pardonon mi petas!

Tria maato:—Do, en tia okazo, vi ne bezonis ŝajnigi morton, ĉu ne?

Curuoka:—Jes, sed mi neniel povis deteni min de tio, ke mi ne faru tion, ĉar mi jam havis la intencon, de kiam mi sursipiĝis en tiun ĉi ŝipon.

Tria maato:—Kio? kion vi diras?

Curuoka:—Jam delonge mi deziradis iri al „Kamĉatka,“ tamen senmone mi neniel povis tion efektivigi. Nu, mi eksciis, ke la ŝipo bonŝanĉe estas veturonta tien. Kvankam mi fariĝis kelnero, tamen mi mem neniom volas fariĝi ŝipano. Kaj mi pensis, ke mi elŝteliĝu el la ŝipo, kiam ĝi atingis la havenon, kaŝiĝinte ie, ŝajniginte en bona okazo morton.

Tria maato:—Kial vi tiel deziras iri al „Kamĉatka?“

Curuoka:—Tie loĝas mia vera patro.

Tria maato:—Do, vi estis ĉe duon-patro ĝis nun?

Curuoka :—Oni ne havus la intereson rakonti al vi pri miaj familiaj aferoj. Ĉiuokaze mi nur deziradis veni al nask-patro, tial mi senpripense kuraĝis okazigi tion.

Tria maato :—Hm, kie vi kaŝiĝis ?

Curuoka :—Mi ne povas diri tion.

Tria maato :—Kial ? ne povas esti, ke vi ne povas diri al mi.

Curuoka :—Ne, nur tion al neniu mi povas diri. Ĉar ŝajnis al mi, ke vi tre zorgas pri mi, mi venis al vi nur tion diri. Do, adiaŭ ! Neniun lasu ekscii pri mi, mi petegas, ĉu bone ?

Tria maato :—Atendu !

Curuoka :—Jam mi sufiĉe longe restis ĉi tie ; mi povis diri ĉion pri la afero. Nenion plu . . .

Tria maato :—He ! Curuoka, mi diras, atendu.

Curuoka :—Ne sekvu min, ne sekvu min.

Tria maato :—Kial vi forkuras, Curuoka ? Curuoka !

Tiam subite oni aŭdas voĉon apud li.

Voĉo :—Kien vi iras ? Estas dangere elkuri !

Tria maato :—Ne malhelpu min.

Voĉo :—Ĉu vi volas vin involvi en la mallumon ?

Tria maata :—Kiu, kiu tiras min ?

Voĉo :—Ĝi estas mi. Via intima amiko mi estas.

Tria maato :—Kion mi vidas !

Voĉo :—Ĉu vi ne vidas min ? . . . Ne estas tie. Ĉi tie,

ĉi tie mi estas. Jĉtu vian rigardon ĉi tien. Kompatinde vi ja ne povas vidi min. Vi ne povos vidi min dum la tuta vivo!

Tria maato:—Ne afektu! kiel vi kuraĝas diri!

Voĉo:—Kun kiu vi nun estis parolanta?

Tria maato:—Tio absolute vin ne koncernas, estas ne via afero, ke mi estis parolanta kun iu.

Voĉo:—Ha ha ha ... Vi intencas kaŝi ĝin. Sed tio al vi ne helpas, se pene vi ĝin kaŝus. Mi ĉion vidis!

Tria maato:—Vi vidis?

Voĉo:—Jes, mi trafas vin en la profundo de la koro.

Tria maato:—Vi vin trompas!

Voĉo:—Estas vi, kiu sin trompas. Kial vi lasas paroli Curuoka'n babiladi pri senbaza afero, veniginte lin antaŭ vi?

Tria maato:—Mi ne vokis lin. Li mem propravole venis ĉi tien.

Voĉo:—Jen, vi mensogas per tio, kion vi ĵus diris. Curuoka, kun kiu vi estis parolanta, estas Curuoka fabrikita de via imago mem. Vi lasas lin multe paroli, por ke li nur estu oportuna al vi. Vi deziregas faciligi al vi vian kulpon almenaŭ iom, lasante lin paroli pri tia afero el la propra buŝo de Curuoka? Mi jam delonge legis vian koron, ke vi estas ruza.

Tria maato:—Kiajn kuglojn vi fandas! Ĉu vi pensas, ke mi havas kapablon fabriki homon?

Voĉo :—Jes, certe jes, ĉar vi lasis paroli mortinton.

Tria maato :—Kio? . . . ĉu vi ja diras, ke Curuoka ne vivas?

Voĉo :—Mi ankaŭ ne estas certa, ĉu li vivas aŭ ne. Sed, tiu, kiu estis nun parolanta kun vi, estas almenaŭ *via* Curuoka.

Tria maato :—For vian ŝercon! Nenio stranga troviĝis en lia agado. Certe li vivas. Li certe kaŝiĝas en la ŝipo, kvankam li perdiĝis de mia okulo, pro via interrompo.

Voĉo :—Memflatema homo vi estas. Se Curuoka estus vivanta, via koro ankaŭ estus trankvila, do pro tio, vi sencele deziras lasi lin vivanta?

Tria maato :—Ne, ne, mi neniel volas diri tiel.

Voĉo :—Ne elturnu vin. Vi tuta estas palpebla al mi. Efektive vi tenas vin tre strange. Ekstere vi konfesas, kvazaŭ vi mem kaŭzis la tutan malfeliĉon, dum interne vi klopodas senkulpiĝi per via tuta povo. Kial vi aranĝas tian farsaĵon? En tia okazo estus pli bone, ke vi nenion diru al la ŝipestro. Kondutu pli bravule! . . . se vi konfesus ĉion antaŭ la ŝipestro!

Tria maato :—Simpla vi estas. Ĉu vi pensas, ke homo estas ligno?

Voĉo :—Prefere estu tia, tiam estus por vi multe pli bone !

Tria maato :—Diablo vin prenu, vi venis por moki min ?

Voĉo :—Mi faris al vi specialan viziton por liberigi vin, ĉar oni mokas vin.

Tria maato :—Mi ja preferas esti ensorĉita de la diablo, pli ol liberigita de vi.

Voĉo :—Vi jam estas ensorĉita de la diablo. Tial do, vi ĉiam estas sentrankvila.

Tria maato :—Ĝene ! rapide eliru, vi diablo !

Voĉo :—Mi eliros, se tion vi volus. Do, bonan nokton !

Tria maato :—Sen ia saluto ! for tuj !

Oni aŭdas eksonon de ŝlosilo turnata ekstere.

Tria maato :—He, kial do ŝlosi tie, nebezone !

Voĉo :—Mi enŝlosis vian ideaĉon.

Tria maato :—Kio . . . kion vi diras ?

Voĉo :—(laŭte ridegas el la tuta gorĝo).

Tria maato :—Malfermu, malfermu ! Se ne, mi ne pardonas ! (furioze frapas pordon).

Voĉo :—(mokeme) Ha ha ha

Subite aŭdiĝas eksonoro, kiu anoncas horon.

Observisto :—(tre mallaŭte) Lanternoj . . . estas . . . en ordo, estro !

Ŝipestro :—B . . . o . . . n . . . e !

Oni aŭdas la respondon de ŝipestro malklare.

Senintertempe sonadas la sireno.

(1927, 7)

— (FINO) —

— Post la laboro —

Fininte tradukadon ĉi tie mi turnas min esprimi mian koran dankon al S-ro Ossaka, kiu afable korektis la tutan manuskripton malgraŭ sia tre okupiteco. Kaj ankaŭ mi dankas al la membroj de Serpento-Rondo, kiuj helpis kaj instigadis min en la tradukado.

Samtempe mi tre ĝojas, ke la aŭtoro de l' verko kun bonkoro afable permesis al mi traduki.

Tutan manuskripton traleginte mi tre hontas, ke mia esprimmaniero estis ofte ne tre bona, tamen mi kuraĝis publikigi ĝin dank' al la admono de la amikoj.

— 1931, 8, 31 —

Tradukinto.

GLOSARO DE TERMINOJ

— 術 語 註 解 —

antaŭ'e'n mal'rapide! 徐行前進

antaŭ'masto 前檣

antaŭmasta topo 前檣樓

antaŭ'parto 船首(ミヨシ)

averta klapo = averta valvo 安全弁

babordo (ruĝa flanko) 左舷

boato'mastro 端艇指命(艇長)

ĉef-hejt'isto 火夫長

ĉef-inĝeniero 機關長

ĉef-maato 一等運轉士

ĉef-mar'isto 水夫長

dejour'anto 當直員

direkt'il'isto 舵手

direkt'il'rado 舵輪

dua maato 二等運轉士

ferdeko 甲板

halt'igu maŝinon! 機關停止!

haveno = ankr'ig'ejo 港, 淀泊地

hisi (ボートなどを)引き上げる

mal'hisi 引きおろす

kajuto 船室

komandant'ponto 船橋

lanĉu boaton! ボートをおろせ

male'n! ゴースタン, 後進!

masto 檣

— mast'ulo — マストの船

maŝino'n orde! 運轉用意

megafono メガホン(擴聲筒)

Nord'e'n 55° oriente! 北五十五度東
nulo! (rekte!) 舵正中! [舵

機を零點, 即ち眞直になせ]

observ'isto (gard'star'anto) 見張番

ofic'isto 高等船員(士官)

ok-sonoroj (ok-batoj) 八點鐘

posta parto 艙(トモ)

paveza ferdeko ウエルデツキ [船

首樓甲板と船橋樓甲板(又わ船

尾樓甲板)との間の防波壁のあ

る凹みとなつた上甲板]

rekt'ig'u = rekt'e'n! 進路元え

ruĝa flanko = babordo 左舷

ruĝ'en tute! 取舵一杯!

sav'buo 救命ブイ

signar'ilo 傳令器, テレグラフ

ŝarg'lampo 荷役(カーゴ)ランプ

ŝarg'ŝipo 貨物船

ŝip'an'aro 乗組全員

teleskopo 望遠鏡

topo 檣樓(クライ)

tria maato 三等運轉士

tribordo = verda flanko 右舷

unu grado 一點 [舵角指示機 ak-

siometro の度盛の一度]

ventol'ilo 通風筒

verda flanko 右舷

verden! 面舵!

我國に於けるエス語普及運動の中心機關

財團
法人 日本エスペラント學會

東京市牛込區新小川町3丁目15番地

電話牛込(34)5415番 振替口座東京11325番

エスペラント普及運動はエスペラント學習者の協同努力によつて始めて促進され得る。一日も早く我國に於ける運動の中樞たる本會に入會して其の活動を援助するのは學習者の義務でありませう。本會は財團法人として文部省の監督の下に講習宣傳、圖書發行等の普及運動をしてゐます。會費年額普通會員 2 圓 40 錢、正會員 3 圓、贊助會員 5 圓等。

本會の詳細規則及發行並に輸入洋書圖書目錄等は 2 錢切手封入御申込み下さい。

本會機關雜誌 { La Revuo Orienta (月刊)會員に
無料頒布
初等エスペラント (月刊)講讀料
年 60 錢

エスペラント書き日本文學

Japana Literaturo en Esperanto

Danco de Skeletoj (秋田雨雀劇曲集)四十錢 (2)

La Turo de Londono (夏目漱石).....十五錢 (2)

Senbedaŭre Amo Rabas (有島武郎)

.....Broŝ. 七十五錢 (4) 上製 Bind. 一圓 (4)

Traktato pri la Origino de Japana Popolo

(日本民族の起原).....十錢 (2)

Verda Karto (大阪朝日入選小説)近刊

昭和6年9月15日印刷
昭和6年9月20日發行

不許
複製

【霧の中】

定價15錢
〔送料2錢〕

著者

東京市外西巢鴨町池袋1281

露木清彦

發行者

東京市牛込區新小川町3ノ15

財團法人 日本エスペラント學會
代表者 大井學

印刷者

東京市神田區三崎町3ノ146

株式會社 一匡印刷所
代表者 高見澤保芳

東京市牛込區新小川町三ノ十五

發行所 財團法人 日本エスペラント學會

(電話牛込(34)5415番)
(振替口座東京11325番)

En La Nebulo 第一版正誤

頁	行	誤	正
2	-12	En la mllum'	En la mallum'
5	1	v rdan	verdan
"	11	pluen!	Pluen!
"	12	pluen, estro.	Pluen, estro.
"	14	Tria mato:—	Tria maato:—
12	1	Sipestro	Ŝipestro
14	9	vin men,	vin mem,
"	-2	proktrastus.	prokrastus.
15	-13	Superenvenantaj	Suprenvenantaj
19	2	mia	Mia
20	-8	bonsânçe	bonsance
22	1	Jêtu	Ĵetu
26	左 7	端艇指命	端艇指令
"	右 2	〔舵 機を零點,	〔舵機を零點,